Universala Esperanto-Asocio

**BARATA SUKCESO**

**Estrara Subteamo: MOVADO**

*Estrara Komuniko EKO 2018-25 sendita el Budapeŝto, la 24-25an de decembro.*

*Al: Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, ILEI-aktivuloj, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en iuj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj.*

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkroĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO de UEA

# Restariga kongreso kreis rezultojn en Barato

La partoprenantoj de la Barata Esperanto-Kongreso (BEK 18) aprobis la elekton de Estraranoj dum la semajnfino  de15-16 decembro) en Puneo. Dudek esperantistoj el 4 landoj partoprenis la Kongreson: krom, kompreneble, de Barato (Hinda Unio)mem. Tiuj estis Gafur MIRZO (Uzbekio), Miko SLOPER (Usono / Nederlando), kaj Olexandr MELNYK (Ukrainio).

Jen la nova estraro de la Federacio Esperanto de Barato (FEB): Prezidanto: d-ro RANGANAYAKULU (Ranga), Hyderabad; Vicprezidanto: d-rino Mina DAN (Mina) Kolkata; Ĝenerala Sekretario: s-ro KOTHA Naga Siva (Siva), Hyderabad; Kasisto: s-ino Kirti Krishna RATNOO (Kirti), Chattisgarh. Bedaŭrinde, nek Ranga nek Mina povis ĉeesti la Kongreson.

La kongresanoj ekvenis al Puneo jam de la 12a de decembro. LKK-anoj, s-roj Nischad SALAM kaj Siva varme akceptis la gastojn; la tria LKK-ano, s-ro S S PAL, atingis Puneon nur dimanĉe, kaj do ne povis ĉeesti la Kongreson (sed vidu sube!). La kongres-hotelo estis tuj apud la kongresejo,. Same kiel por SAS-4, s-ro Juny WILFRED desegnis la emblemon kaj banderolon por BEK 18.

BEK 18 Puneo

Dum la inaŭguro je la Zamenhofa Tago, nome de la kvinkapa Konsilio de FEB, A. Giridhar RAO bonvenigis la kongresanojn kaj klarigis la kongresan temon, 'Barato 19: taskoj kaj defio'.  Sekvis salutmesaĝoj –de ĉeestantoj kaj tutmondaj – tiuj aperos en retejo. De UEA venis salutoj de la prezidanto kaj la vic-prezidanto. Estis klare al la kongresanoj, ke la mondo rigardas al la movado en Barato kun granda intereso kaj espero. Sekvis vigla diskuto pri aktuala temo 'Internaciismo, sennaciismo kaj Esperanto en epoko de naciismo'. Gvidis la sesion Miko.



Dum la unua laborsesio estis anoncita 12-membra Komitato de FEB. Giridhar klarigis la konsiston de la Komitatanoj: temas pri klopodo trovi ekvilibron inter la diversaj regionoj de la lando, inter viroj kaj virinoj, kaj inter novaj kaj spertaj esperantistoj. La kongresanoj aprobis per aplaŭdo la Komitatanojn kaj la Estraranojn de FEB.

Okazis arta vespero. Miko kunkantigis la kongresanojn per kantoj de la muzikgrupo Kajto. Gafur faris vervajn kaj amuzajn prezentaĵojn: kantojn, anekdotojn, ŝercojn, kaj proverbojn. Ĝuis la kulturan

programon la familio Salam, inkluzive d-ro Abdul SALAM, la antaŭa Prezidanto de FEB. La tago finiĝis per kongresa bankedo.

Dimanĉe, unue Miko gvidis la 53-an seminarion pri Aktivula Maturigo (AMO). Tiucele li uzis unu el la lecionoj de la vidbenda-kurso *Pasporto al la tuta mondo*. Aparte la komencantoj tre ŝatis la vidbendon kaj liajn klarigojn. Giridhar sekvis lin per sesio pri la laborplano de la nova Estraro de FEB. La ĉeestantoj kune diskutis la paŝojn eblajn por konsciigo, kapabligo kaj kunordigo de Esperanto en Barato. Venis valoraj ideoj pri disvastigo de Esperanto; pri kursoj kaj kunestoj cele plialtigi niajn lingvonivelojn; kaj pri kunlaborado kun aliaj movadetoj enlandaj kaj tutmondaj. La ĉeestantoj surprenis respondecon por difinitaj taskoj.
Venis du ĵurnalistoj kiuj fotis kaj intervjuis la kongresanojn – la konversacio tiam fluis marathe, angle kaj esperante. La Kongreso finiĝis per bona, kuna tagmanĝo. Sed vespere, ses esperantistoj vizitis s-ron Pal. Kiel diris Nischad, “ĉar s-ro Pal ne povis veni al la Kongreso, la Kongreso venis al li!”





Maldekstre: kongresanoj ĉe komuna manĝo. Dekstre: Grupa vizito al pioniro s-ro S.S. Pal.

Pluraj esprimis sian kontenton pri la Kongreso. Ekzemple, Gafur deklaris: “Mi estas tre feliĉa pri la Kongreso! Mi sentas, ke mi estas kun amikoj kiujn mi konas jam de longe!” Kaj Miko diris: “Mi ege ĝuis la Kongreson, aparte la eblecon renkonti tiom da afablaj novaj amikoj. Dankon kaj ĝis revido!”

Pri la BEK 18 aperis artikolo en la ĵurnalo *Hindustan Times* je 19 Decembro, 2018.

Vidu la retejon de FEB kun pli plena raporto pri la kongreso

https://baratejo.wordpress.com/bek18raporto/

Vortoj: 580

# Novaĵoj el Madagaskaro kaj Benino – kun multo pli

La nova numero de la afrika bulteno jam pretas. Ĝi estas elŝutebla en PDF-dokumento per la sekva ligo:

https://www.esperanto-afriko.org/Esperanto%20en%20Afriko%20%20n-ro%2037.pdf




Inter la bunta enhavo:

- Raporto pri la 1a Afrika Kongreso de Virinoj en Madagaskaro,
- Utila listo de nuntempe aktivaj retejoj tra Afriko
- Duolingo en Afriko
- Raporto pri septembra kaj novembra kunvenoj en Benino

Rigardu la numeron por scii, kiom aktivas la movado tra Afriko. Precipe, se vi pripensas partopreni en la 7a Afrika Kongreso en Burundo en decembro 2019.

# Lahtio? Ja tio indas!

En la jarfino venos al fino de avantaĝa aliĝperiodo por la 104a Universala Kongreso en Finnlando.. Ne maltrafula okazon! Turnu vin al via kotizperanto, aŭ aligu vin rekte per la asocia retejo. Trovu pli da informoj kaj reta aliĝilo en la Asocia retejo:

https://uea.org/kongresoj

Tie vi trovos ankaŭ aliron al la retejo de la Infana kaj Adoleskanta Kongreseto (IIK)

Jen jhusa komuniko de UEA pri la avantaĝoj aliĝi frue:

https://m.facebook.com/story.php?story_fbid=10156340677558577&id=179539493576

Nia revuo *Esperanto* prezentis allogan artikolaron pri la kongreso en la decembra numero ekde paĝo 243. Tio pruvas la valoron de redakcia vizito al la estonta kongreslando. Legu tion kaj konvinkiĝu!  Jam registritaj estas la aliĝoj de 342 personoj el 46 landoj. Pliaj informoj troveblas en la Gazetaraj Komunikoj numeroj 773, 771, 764 kaj 761 (legeblaj en la asocia kongresa retejo.

Skribas la nova estrarano de UEA, s-ro Fernando Maia: “Mi kiel estrarano pri kongreso restas je dispono por pripensi agadojn por ebligi iron de ilialandano al la UK.”





Fotoj: TripAdvisor

Vortoj sume: 920

====================

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado. La prezento nun tute ĝisdata ĝis 2018-14. Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro.

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, volapukistoj, klingonuloj ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.